


2

1981

**MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903**

**OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA**



ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, 11 cours Léopold, F-54042
Nancy Cedex, Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowice, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, L. Kóbor, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Sváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S.P.
Smits; *Pollando:* J. Korytkowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* K. Laughery

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1981:

22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I-00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 780782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

Sur la kovrilo: la preĝejo honore al S. Aleksandro en Varsovio (Pollando), kie okazas Meso en Esperanto (kun posta kunveno en la apuda katekizejo) ĉiun duan dimanĉon je la 17-a horo.

ENHAVO

- 27 Ekumena kongreso IKUE-KELI
- 29 Ni dankas
- 29 Papaj preĝintencoj por marto
- 30 Regularo por la Landaj Reprezentan-
tanoj de IKUE
- 31 Intervjuo kun Jesuo (*P. Scappucci*
kaj *J. Galot*)
- 33 La urbo de la amo (*Spinelli*)
- 34 IKEK: Infana Katolika Esperanto-
Klubo (R. Degrelle)
- 35 Ĉu Esperanto kontraŭ latino?
(*S. Nagy*)
- 36 - Vatikana Radio 50-jara
- 41 Ne plu koincido (*A. De Salvo*)
- 42 Legantoj skribas
- 46 Ni gratulas
- 48 Landaj reprezentantoj de IKUE

La fotoj de ĉi tiu numero estis afable liveritaj de
KELI kaj de la Vatikana Filatela Oficejo.

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70% -
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 liroj.

EKUMENA KONGRESO IKUE-KELI

(Dalfsen, Nederlando, 25.7-1.8.1981)

Serioza partopreno

La Kongreso estos *ekumena*: tio signifas, ke kristanoj el diversaj eklezioj kunvenos por komune pristudi kelkajn problemojn, kiuj nuntempe estas gravaj por la kristanaro. Oni serĉu unuecon kaj inspiron sur komune kristana bazo.

La Kongreso estu praktike utila por ĉiuj, kiuj partoprenos, kaj, pere de ili, por la kristanaj Esperanto-movadoj. En tiu rilato ĝi estu tre serioza, t.e., jam hejme oni preparu sin. La gvida temo de la Kongreso estos: « *La Biblio, bazo de kristana aktivado* ». La unua prelego estos: « *La Biblio kaj la ekumeno* ». La dua: « *La Biblio kaj la paco* ». La tria: « *La Biblio kaj la rolo de la virinoj* ».

En la venontaj numeroj ni donos kelkajn subpunktojn, por ke estu pli facile studi la temojn.

Krome, ĉiutage okazos mallongaj instruaj prelegoj pri bibliaj temoj, kaj instruaj duonhoroj pri la lingvo Esperanto. En ĉi tiu maniero ni esperas altigi la nivelon de ĉi tiu Kongreso kaj de tiuj estontaj.



Intima salono en la kongresejo invitas al amika kunestado

Amikeco kaj Turismo

Memkompreneble, Kongresoj estu ĉiam ankaŭ renkontiĝejoj de agrabla kunestado, kie estiĝas aŭ renoviĝas ligoj de amikeco. Por tio estos sufiĉe da okazoj; nur estas dezirinde, ke oni kunportu sian plej bonan humoron.

Ankaŭ la turisma flanko estos aranĝita kiel eble plej bone: unu tut-taga ekskurso (inkluzivita en la kotizo) kaj tri malgrandaj (libervolaj, malmultekostaj). Kutime estas pluraj kongresanoj, kiuj deziras vidi pli multe de la kongres-lando. Nu, Nederlando havas la avantaĝon de sia malgrandeco; tio signifas, ke ĉiuj urboj kaj turismaj lokoj estas facile atingeblaj. La trajnoj kostas iom malpli ol en multaj aliaj landoj, kaj ili veturas ofte. Regulaj aŭtobus-linioj estas ĉie, la aŭtovojoj estas bonaj, kaj apartaj padoj por bicikloj estas multaj.

Kun multaj nederlandanoj oni povas interkompreniĝi per la lingvoj angla kaj germana. La prezoj ĝenerale estas same altaj ol en la ĉirkaŭaj landoj, nepre ne pli. En multaj vagonaroj oni povas aĉeti trinkaĵojn aŭ manĝaĵojn je normalaj prezoj. Ankaŭ surstrate oni vendas multe, kaj en la tuta lando troviĝas ĉinaj kaj ankaŭ ĉiam pli da italaj restoracioj. Multaj nederlandaj urboj havas interesajn butik-stratojn, plurajn muzeojn, ktp.

La sablo-bordoj ĉe la Norda Maro estas longaj kaj larĝaj, facile alireblaj. La multaj ebenaj kamparoj estas karakterize belaj. Al aŭtomobilistoj ni konsilas veturadojn sur la mallarĝaj vojoj sur la digo, laŭlonge de la grandaj brakoj de Rejno. Estas neforgeseble bele.

En Amsterdamo oni nepre ŝip-veturu tra la urbaj kanaloj, kaj en Roterdamo sur la rivero kaj tra kelkaj grandaj havenoj. La turo « *Euromast* » en Roterdamo donas vere apartan panoramon.

La vetero en Nederlando estas relative milda, sen ekstretoj. Kvankam ni esperas sunplenan kongres-tempon, tamen oni ne forgesu pluv-mantelon.

Mesoj kaj Vesproj

Ĉiutage oni povos (libervole) partopreni Meson en Esperanto, matene, kaj Vesprojn, vespere. Por ke la kantoj estu vere internaciaj, oni bonvolu sendi esperantigitajn kantojn el ĉiuj landoj, kun vortoj *kaj muziko*, al: P. Roger Degrelle, B.P. 23, F-54010 Tomblaine, Francio.

Kotizoj

Kiu ankoraŭ ne anoncis sin, faru tion senprokraste ĉe la kasisto, s-ro Leen Hordijk, van Hogendorpstraat 4, NL 3135 CD Vlaardingen, Nederlando. La ĝirkonto estas 4345686 nome de « Kasisto de Ekumena Kongreso, Vlaardingen, Nederlando ». La kotizo (335 nederlandaj guldenoj ĝis 1.4.1981, 350 poste) entenas la tranoktojn, la manĝojn kaj la tut-tagan ekskurson; ne estas eble aliĝi por parto de la semajno. La garantia sumo (pagenda ĉe la aliĝo) estas 50 nederlandaj guldenoj. La aliĝiloj estas riceveblaj ĉe IKUE kaj ĉe KELI.

Dua listo de kongresanoj (v. EK 1/81, p. 3)

Belgio: P. Alfons Beckers.

Britio: s-ino K. Preston; s-ino M. Broadhead; s-ino Ch. Pearson.

Finnlando: s-ino H. Jaakkola.

Francio: s-ro Ph. Cousson, Fr. R.J. Marmou.

F.R. Germanio: s-ino E. Bork.

Hispanio: s-ro M. Cos Serra; s-ino R. Bellido Guilén.

Hungario: P. Lajos Kòbor.

Italio: P. Duilio Magnani.

Nederlando: s-ino H.C. Verduyn; s-ro L. Hordijk; P.H.J. van Achterberg; s-ino A. van Achterberg-Boenink; s-ino Z. Boven-Slim; s-ro H.A. de Hoog; s-ino Tini Putto; s-ino N. Simonides; s-ino E. Simonides; s-ro J.L. Hut; s-ino J.J. Hut-Broekroelofs; s-ro Jac. A. Tuinder; s-ino V. Tuinder; s-ino G.C.A.M. Dercks; s-ino A.M.J. van Well; s-ino T. v.d. Wal-Petri; s-ino M.v.d. Brink-Sonnenberg; s-ro W. van Ganswijk; s-ino W. van Ganswijk-Vlasbloom; s-ro A. de Vries.

Svedio: s-ro A. Rossdal; s-ino S. Sjöstedt.

Svislando: P. Francisko Bommer.

Entute (ĝis 9.1.1981): 48 personoj el 11 landoj.

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Aŭstrio: Tomasek; *Britio*: Burns; *Francio*: Biron, Goudé M., Lecocq, Michau, Pons, Schneider, Sèvre, Thiollière; *F.R. Germanio*: Blick, Eder J., Greifenegger, Roth, Stettner, Witte; *Italio*: De Salvo, Gambuti, Magnani, N.N., Neri Lami, Nosedà Ceci Neva, Ruaro; *Japanio*: Hosonuma, Japana Filio de IKUE.

Donacis Esperantaĵojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudrak; *Britio*: Kvakera Esperantista Societo; *Ĉeĥoslovakio*: Berka; *F.R. Germanio*: Kondor; *Italio*: De Salvo, Jacobitti, Magnani; *Madagaskaro*: Randrianekena; *Vatikano*: Radio Vatikana.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR MARTO

Ĝenerala: por ke la kristanoj pli ofte kaj pli profitodone aliru la sakramenton de repaciĝo.

Misia: por la Eklezio de Ekvatora Gvineo.

REGULARO POR LA LANDAJ REPRESENTANTOJ DE IKUE

La Estraro de IKUE, per skriba interkonsento, aprobis ĉi tiun regularon por la Landaj Representantoj:

1) La Landa Representanto (LR) de IKUE bezonas la rajtigon de la IKUE-Estraro. La CO proponas lin laŭ ebleco (art. 42 de la IKUE-statuto).

2) Kie ekzistas Landa Ligo (LL) ĝi aŭtomate estas Landa Representanto, kaj ĝia Prezidanto aŭ Sekretario aŭ iu Estrarano prizorgas la rilatojn kun la Centra Oficejo (CO) de IKUE en Romo. En la supraj kazoj, ne estas bezonata rajtigo de la Estraro de IKUE. Se, kontraŭe, la Landa Ligo preferas komisiu alian personon por la tasko de Landa Representanto, tiam estas bezonata la aprobo de la IKUE-Estraro.

3) La LR kolektas la aliĝ- kaj abon-kotizojn (art. 43); transdonas, ĉiumonate, la liston de la pagintaj membroj aŭ abonantoj al la CO; sendas la koncernan monon al la kaso de IKUE; varbas novajn membrojn kaj sugestas al la CO taŭgajn varbilojn; stimulas la malnovajn membrojn aŭ abonantojn pagi la kotizojn.

4) La LR rajtas reteni el la jarkotizoj 5% por siaj ordinaraj elspezoj. Li rajtas ricevi repagon de eksterordinaraj elspezoj nur se la Estraro de IKUE aprobas tiujn elspezojn.

5) La LR reprezentas oficiale IKUE-n antaŭ la landaj aŭtoritatuloj, civilaj kaj ekleziaj (art. 43).

6) La jaraj kotizoj estas decidataj de la Plenumkomitato de IKUE, surbaze de propono de la CO kaj interkonsente kun la LR-oj.

7) La LL kaj la LR devas konservi la jaran liston de la membroj kaj de la abonantoj; jarfine, ili devas sendi al la CO kompletan liston, kaj raporton pri la jara agado.

8) La LR proponas al la CO ekspedi specimenon de « Espero Katolika » (EK), kun la celo varbi membrojn aŭ abonantojn, al la lokaj esperantis-toj. La CO rajtas sendi specimenojn de EK ankaŭ proprainiciate.

9) La eksigon de membro de IKUE decidas nur la IKUE-Estraro, surbaze de dokumenta dosiero transdonita de la LR aŭ LL (art. 8).

10) Ĉiu loka esperantisto aliĝu prefere al IKUE pere de la LR. Ĉiukaze, la CO transdonas al la LR 5% el la kotizo, eĉ se ĝi estas pagata rekte al la CO.

11) La LR sendu, almenaŭ unu fojon en la jaro, cirkuleron al la landaj membroj kaj abonantoj. Se ekzistas landa organo, la kontakto povas esti farata pere de ĝi.

12) La LR sendu al la CO kopion de la gravaj leteroj, kiujn li skribas konekse kun sia tasko. Reciproke, la CO sendu al la LR kopion de la pli gravaj leteroj, kiuj koncernas la landan agadon.

13) La eksigo de la LR estas decidata nur de la IKUE-Estraro. Se LR estas LL, la eksigo de la komisiito kiel LR estas decidata de la LL, interkonsente kun la IKUE-Estraro.

14) Principe, la maksimuma aĝo de LR estas 70 jaroj. La IKUE-Estraro rajtas plialtigi tiun limon, en esceptaj kazoj.

15) Kvankam estas konsilinde, ke LR prezentu mem la personon, kiu transprenos la taskon de nova LR, la decido apartenas ekskluzive al la IKUE-Estraro.

16) Se la LR ne plenumas siajn devojn, la IKUE-Estraro rajtas eksigi lin kiel LR-n, post peto de klarigoj kaj admono.

INTERVJUO KUN JESUO

Vatikana Radio prezentis, 15.5.1979, programon (zorge de Paolo Scappucci kaj Prof. Jean Galot), kiu imagis « *intervjuon kun Jesuo* ». Ni aperigas ĝian esperantlingvan tradukon, zorge de Antonio De Salvo (*):

D. - Jesuo, Vi neniam evitis respondi al tiuj, kiuj demandis ion de Vi. Vi respondis ĉiam al ĉiuj, krom al Herodo, se mi bone memoras. Do, mi ekkuraĝas demandi ion de Vi. Por komenci: ĉu vi ŝatas Vian nomon « Jesuo »?

R. - *Mi ŝatas la signifon de ĉi tiu nomo, kiu signifas « Dio savas ».*

D. - Kion Vi opinias pri tio, ke Via nomo troviĝas nun sur bluzoj kaj blugiĝinoj? (**)

R. - *Iam mi diris: « Se mi estos suprenlevita super la tero, mi altiros ĉiujn homojn al mi » (Jo, 12:32).*

D. - Estas iuj, kiuj surhavas insignon kun la anglalingva frazo « Jesuo vin amas »...

R. - *Per tio scios ĉiuj homoj, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al la alia (Jo, 13:35).*

D. - Nu, ĉu ankaŭ Vi pledas por ke « oni zorgu pri amo, ne pri milito »?

R. - *Amon pli grandan, ol tiun ĉi, neniu havas, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj (Jo, 15:13).*

D. - Kaj kiuj estas viaj amikoj?

R. - *Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi ordonas al vi (Jo, 15:14).*

D. - Kaj ĉu Vi havas malamikojn?

R. - *Satano, sed mi vidis lin kiel fulmon falintan de la ĉielo (Lk, 10:18).*

D. - Kiu estas Via ideo pri feliĉo?

R. - *Feliĉaj estas tiuj, kiuj aŭdas la vorton de Dio kaj observas ĝin (Lk, 11:28).*

(*) La evangeliaj tekstoj estas laŭ la esperanta traduko de la « Biblia Societo », 1913.

(**) Neologismo, proponita de Waringhien, por indiki iun specon de krudŝtofa pantalono.

- D. - En kio konsistas, laŭ Vi, la homa fremdiĝo el propra medio?
 R. - *Ĉiu, kiu faras pekon, estas sklavo de peko (Jo, 8:34).*
- D. - Kion Vi dirus al junulo, kiu uzas narkotaĵojn?
 R. - *Ĉiu, kiu trinkas el tiu ĉi akvo, denove soifos; sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo ŝprucanta supren por eterna vivo (Jo, 4:13-14).*
- D. - Kaj al la fanatikuloj de bomboj kaj revolveroj, kion Vi havas por diri?
 R. - *Ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos (Mt, 26:52).*
- D. - Kian opinion Vi havas pri libereco?
 R. - *Se la Filo liberigos vin, vi estos vere liberaj (Jo, 8:36).*
- D. - Kiu estas la plej granda danĝero, kiu nun minacas demokration?
 R. - *Ĉiu regno dividita kontraŭ si fariĝas dezerta, kaj ĉiu arbo aŭ domo dividita kontraŭ si ne starados (Mt, 12:25).*
- D. - Ĉu estas iu nutraĵo, kiun Vi preferas?
 R. - *Mia nutraĵo estas fari la volon de tiu, kiu sendis min, kaj fini lian laboron (Jo, 4:34).*
- D. - Ĉu ekzistas malvirtoj, kiujn Vi pretas pardoni?
 R. - *Ĉia peko kaj blasfemo estos formetita al homoj; sed la blasfemo kontraŭ la Spirito ne estos formetita (Mt, 12:31).*
- D. - Kion Vi intencas diri?
 R. - *La lumo venis en la mondon, kaj la homoj amis la mallumon pli ol la lumon, ĉar iliaj faroj estis malbonaj (Jo, 3:19).*
- D. - Kiun kvaliton Vi plej multe ŝatas en Viaj amikoj?
 R. - *Estu via parolo: jes, jes, ne, ne (Mt, 5:37).*
- D. - Kion Vi opinias pri la teoriumado de perforto?
 R. - *Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar ili filoj de Dio estos nomataj (Mt, 5:9).*
- D. - Kiel Vi prijuĝas la hodiaŭan mondon?
 R. - *Mi venis ne por juĝi la mondon, sed por savi la mondon (Jo, 12:47).*
- D. - Kaj Vian opinion pri la politika situacio?
 R. - *Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio (Mt, 22:21).*
- D. - Kiun konsilon Vi donus nun?
 R. - *Viglu kaj preĝu (Mt, 26:41).*
- D. - Kion Vi opinias pri iu virino, kiu ne volas abortigi, malgraŭ siaj malbonegaj sankondiĉoj?
 R. - *Ho virino! Granda estas via fido (Mt, 15:28).*
- D. - Se Vi venus hodiaŭ en la mondon, ĉu Vi dirus malsimilajn aferojn?
 R. - *Ĉielo kaj tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos (Mt, 24:35).*
- D. - Kiu estas Via plej granda promeso?
 R. - *Kaj jen, mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo (Mt, 28:20).*

LA URBO DE LA AMO

Mortis, 15.1.81, Pastro Zeno Saltini, la fondinto de la komunajo « *Nomadelfio* » (apud Grosseto, Toskanio, Centra Italio), la urbo, kie regas frata amo (la nomo « *Nomadelfio* », el la greka lingvo, signifas « *loko, kie la amo estas leĝo* »).

Pastro Zeno naskiĝis, antaŭ 80 jaroj, en Fossoli di Carpi apud Modeno (Emilio, Norda Italio); li apartenis al tradiciema familio, kiu posedis vastan bienon en la Pada Ebenajo. Tre baldaŭ, tamen, li forlasis la komfortojn de la familio por dediĉi sin al la revo starigi komunajon de homoj liberaj kaj regataj de la principoj de totala kristanismo. Li decidis iĝi sacerdoto, kaj kiam, en 1931, li celebris sian unuan Meson, li volis ĉe la unua vico, meze de la aŭtoritatuloj, 18-jaran knabon, kiu estis ĵus elirinta el karcero, kie li estis enfermita pro malgrandaj ŝteloj: « *Mi adoptas ĉi tiun knabon kvazaŭ filon* », diris Pastro Zeno. « *Kiu eraris ne sukcesas elaçeti sin, se iu ne fidas al li* ». Tiu estis la unua faro de la batalo de Pastro Zeno por reakiri al la socia vivo la senhejmajn, senkuraĝajn, senesperajn homojn, plejparte infanojn kaj geknabojn orfajn kaj forlasitajn. Naskiĝis, tiel, en la vilaĝo San Giacomo di Roncole, la unua komunajo, kie bonaĵoj kaj laboro estis komunaj. Sed precipe en la tuja postmilita periodo Pastro Zeno trovis sian genton. En 1947, gvidante siajn « *gefilojn* », li okupis la terenon de la iama koncentrejo ĉe Fossoli, kaj sukcesis transformi tiun lokon en urbon, kie la amo estas la sola leĝo. Pastro Zeno laboregis por vivteni sian komunajon. Li frapadis ĉe la pordo de la riĉuloj, kaj li eĉ vagadis tra la stratoj de Modeno, ludante akordionon, por gajni iom da mono. Intertempe, la loĝantaro de Nomadelfio kreskadis, kaj ĉiunomente la komunajo translokiĝis al la ĉirkaŭaĵoj de Grosseto. Sed la iniciato de Pastro Zeno ne ĝuis multe da simpatio ĉe la politikaj kaj la ekleziaj instancoj, kiuj ne ŝatis la komunecan etoson kaj la miksitecon de la familioj. Pastro Zeno, do, forlasis pastrecon, kaj Nomadelfio dissolviĝis. Rezistis nur malgranda kerno, kiun la iama Pastro, iĝinte laiko, organizis sur civila bazo, kiel societon: temis pri 400 homoj dividitaj laŭ 12 « familioj ».

En 1962, Papo Johano 23-a permesis, ke Pastro Zeno reakiru sian pastran oficon, kaj nomis lin parokestro de tiu urbo baziĝanta sur la amo.

Antaŭ ol morti, la fondinto de Nomadelfio lasis spiritan testamenton, en kiu li invitas la nomadelfianojn daŭrigi lian mision; li finas per ĉi tiuj vortoj: « *Kiam mi mortos mi ne volas plorojn, oni ludu valson de Strauss* ».

Teksto de Spinelli, traduko de De Salvo (laŭ Radio Roma-Esperanto)

● ELNA, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (P.O.B. 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono) kongresos en Novjorko 17-21.7.1981, kun programoj ĉe la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉe la novjorka oficejo de UEA (v. EK 10/80, p. 165).

IKEK: INFANA KATOLIKA ESPERANTO-KLUBO

Jen nia dua paĝo. Ĝi ankoraŭ ne entenas viajn leterojn, viajn sugestojn, karaj IKEK-anoj, ĉar necesas iom de tempo por skribi, sendi, aperigi tekston en « Espero Katolika ». Sed estu certaj, ke baldaŭ viaj unuaj ideoj kuŝos ĉi-tie. Skribu tion, kion vi volas: verku poemetojn kaj anekdotojn, donacu vian sperton.

Mi esperas, ke venonte mi ĝojos anoncanta la nomojn kaj adresojn de la unuaj membroj de nia klubo: ĉu geknaboj ne estos multnombraj, dinamikaj, esper-plenaj? Tute ne! Svarmu (*) vervo, svarmu vivo, svarmu graco!

Poezi-flanke

Certe la geknaboj vivas,
lernas, ludas kaj aktivas
sialoke. Sed Kristano
ankaŭ preĝas patran Dion
kaj fid-kantas melodion
al Mari' el kor-fontano.
Ĉu sufiĉas sialande
agi? Krist' demandas skande (**).
Ho knabaro, estu ondo
amon naska. Man-en-mane
kuru teron, kaj hosane
pacon portu al la mondo.

Jesuo-flanke

Ĉiufoje kiam ni partoprenas en la Sankta Meso, ni aŭdas tiujn vortojn el la sacerdota buŝo: *Pacon mi donas al vi, mian pacon mi lasas al vi*. Tiu frazo venas el la koro kaj el la ago de Jesuo. Tuta-vive Li alproksimiĝis kaj al la plenkreskuloj kaj al la infanoj, por disdoni al ili sian amon, sian helpon, sian pardonon, sian pacon.

Jes ja, ni ĝoju pro la paco donita al ni de Kristo. Kaj, danke, ni strebu (***) por starigi, konservi kaj plifirmigi pacon. Ke paco estu via-hejme, via-lernejo, tutmonde.

IKEK-flanke

Kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, sendube pluraj el vi jam estos al mi skribintaj por diri: « *Jes, mi deziras fariĝi IKEK-ano* », aldonante, monuj-malferme: « *Mi sendas la abon-prezon al mia landa peranto por ricevi regule kaj atende nian amatan ligilon* ».

Mi ankaŭ esperas, ke skribante al leter-amikoj pluraj el vi invitos aliajn aliĝi al nia klubo: jes, ju pli ni estos, des pli ni renovigos la tutan asocion kaj la katolikan Esperanto-movadon.

(*) *Svarmi*: esti tre multnombra (laŭ PIV).

(**) *Skande*: ritme.

(***) *Strebi*: energie streĉi la fortojn por atingi celon (laŭ PIV).

Mi deziras nur, ke la proverbo « *De parolo ĝis faro estas tre malproksime* » estos malvera. Mi atendas, do, viajn skribaĵojn, kaj antaŭe dankas, plej frate kaj amike

P. Roger Degrelle

B.P. 23

F-54510 Tomblaine (Francio)

ĈU ESPERANTO KONTRAŬ LATINO ?

Kiom ofte oni aŭdas aŭ legas ĉi tiun riproĉon flanke de ekleziuloj kontraŭ Esperanto (*).

Sed, ĉu vere tiuj « danĝeraj esperantistoj » volas forigi latinon? Nu, ni rigardu la faktojn.

1) En la Dua Vatikana Koncilio latino ne estis la sola oficiala lingvo, kiel ĝis nun dum la Koncilioj, sed ankaŭ aliaj lingvoj. Ĉu Esperanto kulpas? Ĉu Esperanto forigis la latinon? Ĉu la Konciliaj Patroj parolis Esperante anstataŭ latine?

2) La lingvo de la liturgio hodiaŭ jam ne estas nur latino, eĉ, latinaj vortoj apenaŭ aŭdiĝas en la liturgio. Ĉu Esperanto estas ties kaŭzo? Ĉu ĝi forigis la latinon el la liturgio? La esperantistoj nur tion volas, ke Esperanto estu la lingvo de la S. Meso, kiam ĉeestas diversnaciaj esperantistoj. Kaj kial ne povas partopreni S. Meson esperantlingvan la samnacionoj? Ja, ne la lingvo estas la esenco de la S. Meso.

3) La instruado en la Universitatoj, Seminarioj, ne okazas nur latine, sed en pluraj lingvoj. Ĉu pro Esperanto?

4) Ĉu la katolikaj sacerdotoj, dum siaj eksterlandaj vizitoj, vojaĝoj, renkontiĝoj ktp., interparolas latine unu kun la alia? Neverŝajne, sed eblas. Ili povas konversacii unu kun la alia, se ili ambaŭ hazarde parolas la saman lingvon. Sed povas okazi, ke hungara sacerdoto parolas angle, germane, sed itala sacerdoto scias france, hispane. Do, ses lingvoj ne sufiĉas, per ke ili interŝanĝu siajn pensojn.

5) Certaj dokumentoj, libroj, instruoj, statutoj ktp. de la Eklezio estis verkitaĵoj en latina lingvo, kaj ĝis kiam la Eklezio vivos, jene estos. (Pri ĉi tiu punkto kp. « *Latino kaj Esperanto* », EK 10/80. Bonega artikolo, plena de valoraj pensoj). La multlingva Eklezio, kiel monda organizo, bezonas komunan lingvon, kiun ĝi jam havas ekde dumil jaroj, kaj tio estis kaj estos la latino. Samkiel Esperanto ne volas neniigi, « forigi » la gepatrajn lingvojn kaj anstataŭi ilin, sed volas esti la dua lingvo en la internaciaj rilatoj, same *Esperanto ne volas forigi la latinon el la Eklezio, sed volas esti*

(*) Interalie, en la kajero 3/1980 de la latinlingva revuo "*Latinitas*", eldonata en Vatikano, aperas kvinpaĝa artikolo de iu *Henricus Reinhardt*, titolita "*Adversus Esperantistas*", kiu enhavas tiel ofendajn akuzojn kontraŭ la Esperantistoj, ke IKUE sendis al la redakcio oficialan protestleteron. *Noto de la Redaktoro.*

la dua lingvo, sed ne tie, kie la latino estas absolute necesa, bezonata, neanstataŭigebla, sed tie, kie *la latino jam ne volas aŭ ne povas funkcii kiel interkomunikilo*, do inter sacerdotoj kaj fideluloj, *apud la latino, kiu havas sian dumiljaran kaj «eternan rolon» en la vivo de la okcidenta Eklezio*. Esperanto ne volas esti la lingvo de Vatikano, kiu bezonas la latinon; tion la esperantistoj tre bone scias. Oni parolu latine (oficejoj ktp.), «ĉar latino estas la komuna lingvo de la okcidenta Eklezio kaj Vatikano estas ties centro». (Tamen ĝia oficiala organo estas itallingva!).

La esperantistoj ne estas iaspekaj «kontraŭlatinistoj». Do, kion ili volas? La respondo estas facila kaj simpla.

— Kiel oni parolos en la tria Vatikana Konsilio, ni ne scias.

— koncerne la liturgion, por esperantistoj, la S. Meso staras sur la unua loko. Estas bedaŭrinde, pri tio, ke ne ekzistas ankoraŭ definitiva, oficiala, unueca liturgia teksto en Esperanto.

— Seminarioj. Ni petu, ke estu permesite la memvola lernado de Esperanto. «Permeso» ankaŭ tion signifas, ke per diversaj rimedoj ne estu malhelpata la memvola okupiĝo pri ĝi. Voli tion, ke en Esperanto oni instruu kelkajn lernobjektojn, estas naŭva, nepriresponda peto.

— Sacerdotaro. Jen por ili havas Esperanto la plej grandan rolon. Sed eĉ ne nun kontraŭ la latino! Nome la latino neniam estis tutmonda interligilo, lingvo komuna inter la tutmonda sacerdotaro. Ili neniam havis interrilaton per latino unu kun la alia. Esperanto ĝuste tion volas, ke per Esperanto la sacerdotoj povu kie ajn kaj kiam ajn plekti interrilaton ĉu buŝe ĉu per korespondado. Esperanto estu la komuna lingvo, kiam ili renkontiĝas, diskutas, kunvenas, vojaĝas, vizitas sin reciproke ktp. Nur per Esperanto estus eblo — post iom da tempo — *eldoni unulingvan gazeton*, kiun sacerdotaro en metropolo kaj en vilaĝo aŭ en Eŭropo kaj en Afriko komprenas. Per korespondado povas esti ĝi tiel granda reto de kontaktoj, kiu nun apenaŭ estas kredebla. Ĝuste pro tio ni opinias grava, ke la seminarianoj sciŭ pri Esperanto, ja ankaŭ ili estos sacerdotoj.

Ĉu Esperanto volas ĉi-terene «elpeli» latinon? Ne, ĉar ne estas io, kion oni forigu! Kaj jen io tre grava. Esperanto estas por la sciencoj de latino multe pli facila ol por la aliaj, kaj se la gepatra lingvo de la sacerdotaro apartenas al iu lingvo de la hindeŭropa lingvofamilio, li jam scias grandan parton el la vortaro, kaj la gramatiko — kompare kun tiu de latino — estas kelkhora legado.

— Fideluloj. Certe, ke ankaŭ inter ili disvastiĝus Esperanto, se ili vidus la favoran sintenon de la ekleziuloj. Mi pensas, ke Esperanto, ankaŭ en ĉi tiu kazo, ne batalas kontraŭ latino. Esperanto volas, ke la centlingva katolikaro komprenu sin reciproke.

— Ankoraŭ io. Estu permesite, ke en la katolikaj lernejoj, gimnazioj, liceoj, altlernejoj ktp. la esperantistoj povu konatigi Esperanton, povu paroli pri ĝi kaj eventuale ili ne trovu surskribon: «Esperanto estas hobiaĵo, ne lernu ĝin», sed oni legu «la diraĵojn de la papoj pri Esperanto».

Resume. Esperanto ne volas okupi la poziciojn de latino en Koncilioj aŭ en Vatikano aŭ en liturgio aŭ en la Seminarioj, nenie. (Esperanto estis akceptita ĉe la Radio Vatikana, ne post forigo de latino). Esperanto volas esti la dua lingvo apud latino en la vivo de la Eklezio, samkiel, ĝi volas esti la dua lingvo apud la gepatra lingvo. Estas memkompreneble, ke *la esperantistoj volas helpi la Eklezion per Esperanto en la realigo de ĝiaj celoj* kaj ĉi-terene ĝi povas fari multe pli ol latino. Tion oni devas komune ellabori. Esperanto jam trovis sian lokon en la diversaj socioj, same ĝi devas trovi tiun ankaŭ en la vivo de la Eklezio. Jen la vojo de la estonteco.

Esperanto, kiu akuzas vin? Kie estas viaj akuzantoj?

S. Nagy, Hungario

VATIKANA RADIO 50-JARA

Rimedo de evangelizado kaj signo de suvereneco

Vatikana Radio estis inaŭgurita ĝuste antaŭ 50 jaroj (12.2.1931).

Verdire, la teknikaj preparoj por ĝia starigo komenciĝis jam pli frue, en 1929, samtempe kun la Lateranaj Paktoj, kiuj markis la naskiĝon de la malgranda, sed suverena *Stato de Vatikan-Urbo*.



Guglielmo Marconi kaj Papo Pio 11-a en vatikana poŝtmarko, eldonita (kune kun aliaj tri) 12.2.1981, por celebri la 50-jaran datrevenon de Vatikana Radio

La Papo Pio 11-a, tiam reganta, komisiis la taskon starigi radio-stacion al la inventinto mem, Guglielmo Marconi, kiu en tre mallonga tempo pretigis la instalaĵojn.

La inaŭguro, kiel dirite, okazis la 12-an de februaro 1931. Marconi mem anoncis: « *Post kelkaj momentoj, la Sankta Patro inaŭguros la Radio-stacion de la Vatikana Urbo... Dum preskaŭ 20 jarcentoj la Papo aŭdigis la vorton de sia Di-devena instru-raĵto; sed ĉi tiu estas la unua fojo, en kiu lia persona voĉo povas esti aŭskultata samtempe tra la tuta mondo* ».

Kaj tuj la unua, latin-lingva radiomesaĝo de la Papo trakuris kaj kovris la tutan terglobon.

« *Ĉar pro dia mistera plano — diris la Papo — ni sekvis la apostolon Petron, kiu ricevis kun la aliaj la dian taskon prediki al ĉiuj popoloj kaj al ĉiuj kreitaĵoj, ni adresiĝas al ili ĉiuj per la vortoj mem de la Sankta Skribo: Aŭdu, ho ĉieloj... aŭskultu la tero... aŭdu ĉiuj popoloj...* » (*).



« Aŭdu ĉiuj popoloj... »

Avangarda tekniko

Tiu unua instalaĵo disponis pri elsendilo « Marconi » kun potenco de 10 kilovattoj, kiu funkciis laŭ du ondlongoj, per du ĉiudirektaj antenoj.

La Vatikana stacio estis, tiam, la plej alta esprimo de tekniko kaj scienco: ekzemple, la unua radio-ponta stabila komuniko en la mondo estas tiu sta-

(*) Estas interese, ke sur la poŝtmarko eldonita de Vatikano por celebri la 50-an datrevenon de Vatikana Radio, la frazo « *Aŭdu ĉiuj popoloj* » ne estas en latino, sed en itala lingvo.

rigita de Marconi en 1933, per la radia kunligo de Vatikano kaj Castelgandolfo (la somera papa rezidejo, je distanco de kelkaj dekoj da kilometroj el Romo).

Sed la radia progreso baldaŭ igis ne sufiĉa la instalaĵon. En 1937, do, la vatikana stacio estis provizita per nova elsendilo 25-kilovatta, por kurtaj ondoj, reguligebla laŭ 10 malsamaj frekvencoj. Kvar antenoj anstataŭis la komencajn du, kaj kvina anteno estis ĉiudirekta.

Ekde 1940 okazis ĉiutage programoj en lingvoj itala, angla, franca, germana kaj hispana; krome, du aŭ tri fojojn en ĉiu semajno ankaŭ en la lingvoj portugala, pola, ukraina, litova kaj rusa.

Helpe al la viktimoj

Tiom da fervoraj iniciatoj estis abrupte interrompitaj de la dua tutmonda milito. La Vatikana Radio, tiam, fariĝis Informa Oficejo por priserĉado de viktimoj de la milito, de milit-kaptitoj kaj de netroveblaj homoj. En la periodo 1940-1946, Vatikana Radio elsendis, entute, 1.240.728 mesaĝojn.

Teknika modernigo

Sampaŭe kun la teknika progreso, renoviĝadis la aparatoj de Vatikana Radio. Alvenadis, tiucele, mon-oferoj. La plej grava donaco venis de la nederlandaj katolikoj, kiuj, per la kampanjo « *Unu miliono da guldenoj por la Radio de l' Papo* », ebligis la aĉeton de 100-kilovatta send-aparato por kurtaj ondoj.

Sed pli potencaj sendiloj kaj antenoj (precipe por mezaj ondoj) estis bezonataj. Tamen, la Vatikana Ŝtato montriĝis tro malgranda kaj sufokita en la centro de Romo; tiel, oni decidis starigi tute novan stacion *ekster la urbo*.

Kiel sidejo estis elektita la zono *Santa Maria di Galeria*, 18 kilometrojn for de la urbocentro. En 1952 estis subskribita konvencio kun Italio, kaj komenciĝis la laboroj por starigo de radio-stacio sur areo *10-oble pli vasta ol Vatikano*.

La nova stacio (kunligita radio-ponte kun Vatikano) estis inaŭgurita de Papo Pio 12-a, kiu, en tiu okazo, plenumis *la plej longan vojaĝon de sia papeco*, de Castel Gandolfo al Santa Maria di Galeria (proksimume 50 km: kiel ŝanĝiĝis la tempoj...).

La instalaĵoj

La stacio estis ekipita per la 100-kilovatta elsendilo por kurtaj ondoj donacita de la katolikaj nederlandanoj; per 2 elsendiloj « *Brown Boveri* », en unuopa potenco de 10 kilovattoj, funkciantaj ankaŭ paralele; kaj per alia 100-kilovatta elsendilo por mezaj ondoj.

Krome, impona komplekso de 21 direkteblaj antenoj por kurtaj ondoj (kiuj povis, en nur kelkaj sekundoj, esti kunligataj 6-ope), kaj unu ĉirkaŭradianta anteno por mezaj ondoj.

Al tiuj instalaĵoj, kiuj ankoraŭ nun ebligas grandan parton el la ĉiutagaj elsendoj, aldoniĝis, en 1961, nova elsendilo 100-kilovatta por kurtaj ondoj (« Telefunken »), donacita de la germana kardinalo Frings, kaj alia, same 100-kilovatta, donacita de la katolikoj de Aŭstralio kaj Novzelando.

Novaj, potencaj aparatoj estis donacitaj de la usona kardinalo Spellmann kaj de la « Kavaliroj de Kolombo », kaj elsendilo 250-kilovatta por mezaj ondoj de pluraj usonaj organizoj.



La orientiĝa anteno de Radio Vatikana

La nuna, totala potenco atingas 1.500 kilovattojn, tiel ke Vatikana Radio, ankaŭ dank' al direkteblaj antenoj, atingas ĉiun parton de la terglobo. Precipe kunhelpas en tio la plej freŝa elsendilo, 500-kilovatta, de firmao « Telefunken », kaj la nova plurbenda orientiĝa anteno, kiu konsistas el du metalaj latis-turoj, 79 metrojn altaj kaj 85 metrojn distancaj inter si, kiuj sin apogas al centra akso laŭvole orientiĝebla; inter la du turoj pendas la disradianta sistemo, konsistanta el duobla dupolusa kurteno.

La aŭdebleco eĉ pliboniĝus, se Vatikana Radio povus havi ripetajn staciojn en aliaj landoj; sed tio ne eblas, pro diversaj kaŭzoj.

En 34 lingvoj

Proksimume 300 personoj laboras stabile ĉe Radio Vatikana, kaj 200 sporade. Ili apartenas al 43 malsamaj nacioj (plimulte temas pri laikoj, sed ne mankas geregiuloj), kaj prizorgas programojn en 34 lingvoj, inkluzive de Esperanto.

*Laŭ Vatikana Radio, Esperanto
adaptis kaj koncizigis Antonio De Salvo*

NE PLU KOINCIDO

Sabate Romo, dimanĉe Vatikano

Oni bezonis 4 jarojn, sed fine oni solvis la problemon de la samtempeco de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma (Itala Radio/RAI) kaj Vatikana Radio: ekde marto 1981, Radio Roma elsendos en Esperanto ne dimanĉe, kiel ĝis nun, sed *sabate*. Restos senŝanĝaj la horoj (20.00-20.20 laŭ grenviĉa tempo, 21.00-21.20 laŭ mez-eŭropa tempo) kaj la ondlongoj/frekvencoj (metroj 31,33 - 41,15 - 41,24; kilohercoj 9575 - 7290 - 7275).

Ne estis facile trovi la solvon al la problemo de samtempeco, ĉar la du stacioj, kvankam ambaŭ en Romo, *apartenas al du sendependaj kaj suverenaj Ŝtatoj* (respektive, Italio kaj Vatikano). Krome, nek Vatikana Radio nek la Esperantistoj deziris forigon de la vatikana programo el la nunaj tago kaj horo, ĉar tiu programo okazas tuj post la Rozario, kiam ĉiuj elsendiloj estas funkciaj, ĉiudirekten. Restis, do, la solvo ŝanĝi la horon aŭ la tagon de Radio Roma; kaj oni decidis ŝanĝi la tagon: la Esperanto-programo anstataŭos la danan elsendon, kiu, siavice, surondiĝos dimanĉe anstataŭ sabate.

Estus tre bele se la Esperantistoj skribus dankajn vortojn al Radio Roma pro ĝia saĝa decido (adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio).

Oni bonvolu memori, ke la korespondataĵoj pravas, ke iu radio-programo estas aŭskultata, aŭ almenaŭ dezirata (*ankaŭ se oni ne sukcesas aŭdi la elsendon, oni skribu por diri tion!* Des pli bone se, anstataŭ skribi simplan plendon pri neaŭdebleco, oni sendas negativan raporton de aŭskulto, indikante teknikajn donitaĵojn: tipon de radio-aparato kaj de anteno, provitajn ondlongojn/frekvencojn, spertitajn malfacilaĵojn). Al la ĝustaj raportoj de aŭskulto (kun indiko ankaŭ de detalo el la aŭskultita elsendo) oni respondas per konfirmo-kartoj en Esperanto.

Se oni sendas plurajn raportojn de aŭskulto en unu sola koverto, oni bonvolu skribi ilin sur apartaj folioj.

Kion skribi?

Jen kelkaj frazoj, kiujn oni povas skribi al Radio Roma (temas, kompreneble, pri nur kelkaj ekzemploj):

1) Mi ĝojas kaj dankas, ke via programo ne plu koincidas kun tiu de R.V.;

2) Mi ŝatus aŭskulti vian programon; bonvolu diri al mi la horaron kaj la ondlongojn;

3) Bonvolu sendi al mi vian senpagan program-broŝuron en lingvo... (angla, franca, germana, hispana, itala);

4) Via program-broŝuro ne aperas, bedaŭrinde, en mia lingvo; ĉu oni povus aperigi resumon en Esperanto? Aŭ, almenaŭ, ĉu povus esti en Esperanto la indikoj, kiuj koncernas la Esperanto-programon?

5) Kial Radio Roma estas pli malbone aŭdebla ol Radio Vatikana, kvankam ambaŭ stacioj elsendas el Romo? Ĉu Radio Roma planas plipotencigon?

6) De kiom da jaroj Radio Roma elsendas en Esperanto?

Pli da varieco!

Duono el la 622 korespondaĵoj alvenintaj al Radio Roma dum 1980 estis « produktita » de nur 20 homoj; *ĉu vere ne eblas, ke pli multe da Esperantistoj skribu, tiel ke estu pli da varieco en la nomoj de la korespondantoj?* Pli granda varieco, interalie, ankaŭ donus pli efikan valoron al la nombro de la korespondaĵoj, en si mem rimarkinda.

Antonio De Salvo

(Redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma)

LEGANTOJ SKRIBAS

● Kun granda intereso mi legis (EK 9/80) la artikolon « IKUE-kunveno en Stokholmo ». Interalie la kunvenantaj IKUE-anoj plendis, ke Radio Vatikana kaj EK estas tro katolikaj.

Kredu, ke ĉi tiuj plendoj ne nur ĉagrenis, sed eĉ iomete kolerigis min. Al la klarigoj de la redaktoro mi volas aldoni, ke mi supozas, ke la plendantoj vivas en landoj kun *tro* granda religia libereco, pro tio ŝajnas al ili RV kaj EK *tro* katolikaj. Mi rekomendas, ke ili translokiĝu, por ke ili rapide ŝanĝu sian opinion. Poste ili postulos, ke RV kaj EK fariĝu ankoraŭ *pli* katolikaj, se eblas, ĉar RV kaj EK fariĝus por ili la sola spirita nutraĵo, kies valoron ili kapablu pli ĝuste pritaksi. Pardonu, mi volis ofendi neniun, mi ja plene respektas la rajton de ĉiu libere esprimi sian opinion, sed eĉ Kristo indigniĝis, se temis pri gravaj aferoj.

El Ĉeĥoslovakio

● En la tagoj 13-14.12.1980 okazis en Krakovo (Pollando) « *Tagoj de Zamenhof* », dum kiuj P. Wiesław Martuszewski aranĝis Meson en la preĝejo de Patroj Franciskanoj. Alvenis multaj geesperantistoj el diversaj landoj; la kapelo estis plenplena. Longe ni memoros la liturgion, predikon kaj kantadon: multaj, kiuj unuafoje partoprenis en tia kunveno, estis kortuŝitaj.

El Pollando

● Leginte la artikolon « *Pri kotizoj* » en EK 11-12/80, mi opinias, ke oni povus malfermi specialan konton por ricevo de donacoj por helpi tiujn membrojn, por kiuj la kotizo-pago estas tro peza. Mi mem tuj ĝiras donaceton al la poŝta konto de IKUE.

René Lecocq, Francio

● Unu aferon ŝarĝas mian koron kaj turmentas miajn pensojn.

Vivis kun ni, esperantistoj, en Gliwice (Pollando), samideanino, Zofia Giedroyć-Fick. Ŝi estis gaja, bonkora, tute sindona al la Esperanto-afero. Arde ŝi batalis, instigis, varbis. Ŝi partoprenis la IKUE-kongresojn en Romo (1975) kaj Ĉenstoĥovo (1977), kaj la Spiritajn Ekzercojn en Gostyń.

Bedaŭrinde, pro longdaŭra malsano ŝi forpasis 18.2.1979. Dum la entombigo neniu eĉ menciis, ke ni adiaŭas esperantistinon, kaj en neniu revuo aperis iu ajn sciigo pri tiu malĝoja foriro. Tiom vigla, ofte eĉ laŭta persono, forpasis tiel silente, preskaŭ nerimarkite. Nur ŝia edzo, la esperantisto s-ro Kazimierz Fick, ĉiun tagon vizitas ŝian tombon.

Modeste mi demandas, ĉu eblas menciĝi en EK la datrevenon de la morto de tiu vere ard-kora esperantistino?

Maria Olund-Zielińska, Svedio/Pollando

● En EK 10/80 mi legis, ke en Brazilo ekzistas ankoraŭ pli ol 200 ekzempleroj de la «Memorlibro de la Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno». Estus bone, se ankaŭ la libroservo de IKUE ofertus ĉi tiun libron, kiu estas tre interesa kaj valora; se ĝi ne estas ofertata, neniu scias, ke ĝi ekzistas kaj estas ankoraŭ havebla. Estus ankaŭ bone, se la katolikaj libroj estus haveblaj ankaŭ en la naciaj Esperanto-centroj.

Wilhelm Witte, F.R. Germanio

Vi pravas. Sed, bedaŭrinde, la C.O. de IKUE ne havas la eblecon stoki novajn librojn, pro absoluta manko de spaco. Tie, ja, ankoraŭ kuŝas rimarkinda kvanto da kelkaj eldonajoj, kiuj okupas multe da loko. Unu el la iniciatoj, kiujn de kelka tempo oni prizorgas por mildigi la situacion, estas ĝuste la liverado de libro-stokoj al naciaj libroservoj aŭ al landaj reprezentantoj de IKUE (ekz., en F.R. Germanio al la Esperanto-Centro Paderborn kaj al Sarlanda Esperanto-Ligo; en Hispanio, al la Hispana Esperanto-Federacio; en Francio, Jugoslavio kaj Pollando, al la landaj reprezentantoj de IKUE). Kiam estos spaco je dispono, oni povos pensi pri mendoj de aliaj titoloj kaj pri eldonado de novaj verkoj.

Antonio De Salvo

● Bonvolu, mi petas, klarigi ĉi tiujn vortojn, kiujn mi legis en EK: abnorme, klefo, alumnoj, palotano, krokodili.

« Malklera leganto » el Francio

Mi tuj diru, ke vi ne estas « malklera », kiel vi sprite diras, pro nekono de kelkaj vortoj.

Ne ĉiuj, ja, povas havi je dispono PIV (Plenan Ilustritan Vortaron); kaj ne ĉiuj bezonataj vortoj troviĝas eĉ en tiu grandega vortaro: jen kial povas okazi, ke kelkaj vortoj legeblaj en EK ne estas tuj kompreneblaj (kvankam mi zorge klopodas uzi lingvaĵon kompreneblan).

Koncerne vian peton de klarigoj, jen la signifoj de la menciitaj vortoj:
abnorme = ne-norme (laŭ PIV);
klefo = per figura-senca plivastigo de la signifo indikita en PIV (« signo lokata ĉe la komenco de la notliniaro por montri la nomon de la noto kaj ĝia alteco »), oni parolas pri la « starpunkto, de kiu oni alrigardu kaj interpretu ion »;
alumnoj: efektive temas pri neologismo, netrovebla en PIV aŭ aliaj vortaroj, kiu indikas la seminarianojn (studentojn de teologio);
palotano: ano de la instituto de sekularaj (nemonahaj) pastroj fondita de la itala sanktulo Vincenzo Pallotti;
krokodili: paroli nacilingve en Esperantista medio (laŭ PIV).

Antonio De Salvo

● EK de tempo al tempo aperigas sur siaj paĝoj la liston de libroj aĉeteblaj ĉe la C.O. de IKUE.

Lige kun tio — du rimarkoj:

— La nombro de libroj estas ĝene modesta. Krome, ekde du jaroj ĉiam la samaj titoloj. Dum longaj monatoj aperas nenio nova. Kial? Ĉu ni ne bezonas bonan, religian literaturon? Malkvietiga estas tiu ĉi eldona stagno.

— Foliumante la esperantan gazeton oni facile rimarkas, ke ĉiu nova, esperanta libro, ĉu originalo ĉu traduko, estas diligente anoncata kaj fake recenzata. Kial EK ne faras la samon? Malsufiĉas indiki nur la liston de libroj, iliajn aŭtorojn kaj titolojn. Necesas preparoli la enhavon de ĉiu libro, ties lingvan valoron ktp. Faka, preciza recenzo estas la plej efika reklamo. La legontoj volas scii, kion ili aĉetas, kio estas aĉetinda.

Pro tio, anstataŭ plendi, ke niaj libroj — cetere laŭtitole malmultaj — okupas lokon de la C.O. nevendite, ni komencu reklami ilin per bona recenzo. Ekzemple, mi ĝis nun vane atendis sufiĉan rekomendon de la libro: « *Francisko el Asizo, Profeto por nia tempo* », kiun mi konsideras tre valora kaj interesa. « *La dia avarulo* », eldonita en la jaro 1979, estas rimarkita kaj recenzita — nur en « *Esperanto* » (11/80).

Konklude: bonvenaj estas novaj libroj kaj detalaj recenzoj!

P. Johano Kos, Pollando

Vi pravas, ke en EK ne aperas recenzoj de libroj, sed nur mencioj. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke bedaŭrinde mi ne kapablas recenzi. Kun plezuro, tamen, mi gastigos recenzojn verkitajn de aliaj.

Pri la eldona agado de IKUE oni baldaŭ diskutos en estrara-komitata kunsido, kaj dum la Kongreso de Dalfsen/Nederlando.

Antonio De Salvo

● En Budapeŝto (Hungario) jam de 4 jaroj oni celebras S. Meson en Esperanto, la duan dimanĉon de ĉiu monato je 15,30. La loko troviĝas en la kapelo de la paroĥejo « *Kristus Király* » (*Kristo Reĝo*), en la urbocentro (*).

(*) V. EK 11-12/80, p. 197.

Tiuj 4 jaroj havas sian historion. En la unuaj tempoj ni, laikaj virinoj, kopiis la mestekston por ĉiu okazo, kaj multobligis ankaŭ la kantojn, tradukitajn de pastro Ferenc Nádi. Ne havante kantiston, ni ludis harmoniumon. Kiam la celebranto ne scipovis sufiĉe bone Esperanton, ni meditis pri la Evangelio. Nun ni havas bonegan esperantistan celebranton, P. Ferenc Nádi, kiu, bedaŭrinde, loĝas 80 km distance de Budapeŝto. Ni, ankaŭ, nun havas kantistinon, eminentan, kvankam ne profesion.

Post la S. Meso ni kunvenas en la baptokapelo, por pritrakti Esperantajn informojn pri IKUE. La partoprenantoj estas egalproporcie viroj kaj virinoj, sed, bedaŭrinde, malmultaj.

La malgranda komunumo havas ekumenan karakteron. Protestantaj gefratoj ne nur ĉeestas, sed eĉ kunlaboras; ankaŭ ni partoprenas ilian « *Biblian Horon* ».

Anna Németh, Hungario

● La 20-an de decembro 1980 katolikaj Esperantistoj renkontiĝis en Niepokalanów (Pollando), loko de la Senmakula Virgulino, por travivi unu tagon de Advento en plena amikeco.

La S. Meso estis celebrita de P. J. Zielonka, kun la asisto de frato Kornel Kaczmarek, proksimulo de P. Maksimiliano Kolbe.

Vespere, la kunvenintoj pasigis tre agrablajn kaj kortuŝajn horojn, kantante kristnaskajn kantojn kaj reciproke bondezirante al si feliĉon laŭ la pola tradicio.

Oni ne forgesis la misian aferon; tiucele, estis kolektita donaca monsumo.

Marta Sosińska, Pollando

● *Heroldo de Esperanto*, la plej ofta internacia gazeto de la Esperanto-Movado, estas de pli ol 60 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo.

Ĝi proponas: 17 numerojn jare; aktualajn, ilustritajn raportojn el la tuta mondo; junularan, instruistan, literaturan rubrikojn; librorecenzojn, liston de fakaj artikoloj en Esperanto; duoblan kongresan numeron, kalendaron de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj; liberan Tribunon de la legantoj, anoncetojn, ŝak-problemojn, krucvort-enigmojn, foto-filmon; sciencajn suplementon, ktp.

Jara abono por 1981: 15 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez 28, 6° A, Madrid 16, Hispanio.

● La 52-a Itala Kongreso de Esperanto, kiu havos *Eŭropan* karakteron, okazos en Romo de la 19-a ĝis la 24-a de septembro 1981. Informoj ĉe la Itala Esperanto-Federacio, via Villorosi 38, I-20143 Milano, Italio.

● Por-infana Amikeca Renkontiĝo okazos en Balatonfüred, Hungario, de la 31-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto 1981, kun la celo krei amikecon inter infanoj, kiuj jam lernas Esperanton, kaj montri al ne-esperantistoj, ke la internacia lingvo estas perfekta ilo por kreskigi tian amikecon.

La programo antaŭvidas studhorojn (intensajn sed gajajn), ludojn, kantadon, ekskursojn, popol-dancadon, banadon, ktp.

Informoj ĉe Christopher Fettes, St Columba's College, Dublin 16, Irlando.

NI GRATULAS

● De la 15-a ĝis la 30-a de oktobro 1980, la konata franciskano P. Albino Ciccanti el Rimini (Italio), Komitatano de IKUE, aktivis en Novjorko (Usono), precipe ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, kunlabore kun la Oficejo de UEA, kiu tie funkcias de kelka tempo (v. EK 10/80, p. 165).

Interalie, P. Ciccanti havis kontaktojn kun Mons. Ettore Di Filippo, kiu de 15 jaroj deĵoras ĉe la Konstanta Komisiono de la Sankta Seĝo ĉe U.N.; Mons. Di Filippo afable kaj longe konversaciis kun P. Ciccanti, montrante plenan konvinkigon pri la graveco de neŭtrala, komuna lingvo.

P. Ciccanti estis ankaŭ intervjuita de ĵurnaloj, pres-agentejoj kaj radio-stacioj.

● En 1981 okazas la *Ora Esperantista Jubileo* de Pastro Alfons Beckers (Belgio), Honora Prezidanto de IKUE, Estrarano de 1939.

● En aŭtuno 1956 la tiam 14-jara Antonio De Salvo (Italio) eklernis Esperanton; ĉijare, do, estos lia *Arĝenta Esperantista Jubileo*.

● Okaze de paroka festo, 30.11.1980, la Esperantista Grupo de Ambaton-drazaka (Madagaskaro), sub la gvido de s-ro Roger Randrianekena (Landa Reprezentanto de IKUE), prezentis al la parokanoj du spektaklojn, konsistantajn el esperantigitaj popol-kantoj de diversaj nacioj. Tiu formo de propagando de Esperanto multe entuziasmigis la publikon.

● Kelkaj membroj de la Katolika Esperanto-Centro de Milano (Italio), inter kiuj la Komitatano de IKUE Prof-ino Serenella Giacchino, partoprenis, la 15-an kaj la 16-an de novembro 1980, gravan kunvenon en la Regiona Lombardia Seminario, pri la temo « *Projekto de la katolikoj por Milano. Kultura perspektivo por la atesto de la kredo* ».

La geesperantistoj prezentis siajn spertojn (precipe pri internacia korespondado) en la komisiono « *Lernejo kaj socio: la esperoj de la junularo* ».

● P. Stanisław Pietrzak (Pollando) estis nomita Parokestro.

● Nova, sed jam tre agema katolika Esperanto-Grupo estis fondita en Trento (Italio), zorge de s-ro Pietro Dao, Dumviva Membro de IKUE. La kunvenoj okazas ĉe la Monaĥejo de Patroj Franciskanoj (strato Grazioli), la unuan mardon de ĉiu monato je la 17-a horo, kun la anim-zorga interveno de la parokestro, P. Eliseo Onorati, kiu promesis denove studi Esperanton.

La Grupo (kiu informis pri sia agado la Episkopon) nun planas starigi dialogon kun la katolikaj organizoj kaj kun la gazetaro de Trento-lando, kun la precipa celo okazigi Esperanto-kursojn en la Seminarioj.

● La Franciskana Esperanto-Centro de Rimini (vicolo S. Bernardino 26, I-47037 Rimini, Italio, poŝta konto 13994470 laŭ la nomo « Centro Esperantista Riminese ») ĵus eldonis, kunlabore kun la Turisma Entrepreno de Asizo, 2 belegajn kolorajn bildkartojn, respektive kun la « *Simpla preĝo* » kaj kun la « *Kantiko de la Kreitaĵoj* » de S. Francisko. La kartoj ne estas vendataj, sed oni petas kontribuon por repagi la kostojn.

Oni povas mendi la kartojn ankaŭ pere de IKUE (minimuma donaco por ĉiu karto, inkluzive sendokostojn, 150 liroj aŭ egalvaloro).

● P. Duilio Magnani, Prezidanto de IKUE, vizitis Sovetunion en novembro 1980, kiel membro de delegacio de samcivitanoj de Rimini, invititaj de la ĝemela urbo Soĉi. En tiu okazo, estis subskribita interkonsento inter la Esperanto-klubo de la du urboj, por pli-intensigo de reciprokaj kontaktoj.

● D-ro Josef Kondor (Alte Schloss-Str. 25, D-545 Neuwied 21 — Engers, poŝta konto 113726-673 Ludwigshafen/Rhein, F.R. Germanio) aperigis novan tipon de glumarko kun dulingva teksto (en Esperanto kaj en la germana) « Helpu al la lepruloj ». Unu folio kun 32 glumarkoj kostas 2 germanajn markojn.

Per la vendo de glumarkoj, d-ro Kondor sukcesis kolekti por la lepruloj 17.000 germanajn markojn!

● P. Manuel Casanoves el Barcelona, Hispanio, Dumviva Membro kaj Komitatano de IKUE, estis elektita Prezidanto de la ĵus restarigita « *Kataluna Esperanto-Asocio* ».

● En la 15-a (kaj lasta) volumo de la katalun-lingva Enciklopedio « *Gran Enciclopèdia Catalana* » aperas 17-linia noto pri D-ro Zamenhof, verkita de P. Manuel Casanoves. En pli fruaj volumoj jam aperis aliaj priesperantaj kontribuajoj de P. Casanoves.

● En la sama « *Gran Enciclopèdia Catalana* », ĉe la litero « L » oni trovas la nomon de Renat (René) Llech-Walter el Perpignan (katalun-lingva parto de Francio), Dumviva Membro de IKUE. Estas menciita tie la agado de René Llech-Walter koncerne katalunan lingvon kaj literaturon kaj Esperanton.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkoton al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspeĝo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
RA - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
sil. 170

Belgio

M. Audenaert
Beekstraat, 6
B-9100 Lokeren
p.k. 000-0522242-91; b. fr. 400

Brazilo

P. Petro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S.P.
cruz. 500 - aerp. 700

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhličce 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetín

Francio

P. R. Degrelle
B.P. 23
F-54510 Tomblaine
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 56

F R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D- 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 25

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martínez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 900

Hungario

P. Lajos Kòbor
Fö u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
« Monksilver », Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavík

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 28/19956 (UECI) -
lir. 10.500

Japanio

Hatirō Matubara
Namimatu-tyō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruić
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 300

Kanado

Sino P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Apartado aéreo 51740
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianekena
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax

Nederlandio

S. P. Smits
Dunantstraat. 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 27

Norvegio

S. Murak
Semsyn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

G.D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL - 59312 Chocianowice
zl. 300

Portugalia

Port. Esp. Asocio
Rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
600 esk.

Svislando

P. Francisko Bommer
Collège S. Marie
CH - 1920 Martigny
sv. fr. 22

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. Marko Ŭang Bu-jung
Catholic Church
4 Pei-ping Road
Hualien, Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
P.O.B. 1042
Indian Rocks Beach
Florida 33535
us. dol. 13 - aerpoŝte 17

